

# La disvolviĝo de Bahaa Esperanto-Ligo (BEL)

La unua duonjarcento – de 1973 ĝis 2023

## *Enkonduke – la fundamentoj*

La Bahaa Kredo estas monda religio fondita meze de la deknaŭa jarcento de Bahá'u'lláh<sup>1</sup>, kiun Liaj adeptoj, la bahaanoj, kredas esti la Promesito de ĉiuj epokoj. La kerna celo de Bahaismo estas la unueco de la tuta homaro, la kreo de tutmonda socio surbaze de unueco en diverseco. Bahá'u'lláh diras: »Kion la Eternulo ordonis kiel suverenan kuracilon kaj plej fortan rimedon por resanigi la tutan mondon, estas la unuigo de ĉiuj popoloj en unu universala religio, unu komuna Kredo.«<sup>2</sup>

Ja ĉiuj Kredoj kaj la tradicioj de preskaŭ ĉiuj popoloj promesas estontecon en kiu paco kaj harmonio regos surtere kaj la homaro vivos en prospero. Bahaanoj kredas ke tiu promesita epoko komenciĝis kun la veno de Bahá'u'lláh kaj ke estas Liaj instruoj kiuj ebligas al la homaro konstrui tiun novan mondon.

Unu el la principaj instruoj de Bahá'u'lláh por atingi tuthomaran unuecon estas la enkonduko de universala lingvo: »Alproksimiĝas la tago kiam ĉiuj popoloj de la mondo estos akceptintaj unu universalan lingvon kaj unu komunan skribon. Kiam estos tio atingita, homo vojaĝanta al kiu ajn urbo kvazaŭ sian propran domon eniros... Tiu vere estas homo, kiu hodiaŭ dediĉas sin al la servo al la tuta homaro... Ne glori sin tiu, kiu amas sian propran landon, sed tiu, kiu amas la tutan homaron. La Tero estas nur unu lando, kaj ĉiuj homoj ĝiaj civitanoj.«<sup>3</sup>

Surbaze de tio ne povas mirigi ke jam tre frue en la disvolviĝo de la bahaa komunumo stariĝis intimaj ligoj al la Esperanto-movado. Estas fakte indikoj ke komence de la 20a jarcento la tiutempaj bahaanoj estis grandparte konvinkitaj ke estas ĝuste Esperanto tiu internacia helpa lingvo, kies enkondukon profetas iliaj sanktaj skriboj. Lidia

Zamenhof en letero de marto 1938 eĉ konsideris Esperanton »tiu lingvo, kiu – mi estas profunde konvinkita – estis kreita rekte sub la influo de Bahá'u'lláh, kvankam la aŭtoro de la lingvo tion ne sciis.«<sup>4</sup> Siatempe almenaŭ en Eŭropo plejmulto el la bahaanoj estis ŝajne, se ne aktivaj esperantistoj, minimume apogantoj de la Lingvo Internacia.

Al tio ankaŭ forte kontribuis la favora sinteno de 'Abdu'l-Bahá<sup>5</sup> elmontrita precipe dum Liaj historiaj vojaĝoj al la Okcidento en 1911–1913 kiam ankaŭ plurfoje Li parolis antaŭ esperantistoj, esprimis sian altan estimon pri la movado kaj rekte alvokis al plua disvastigo de la lingvo. Post la forpaso de 'Abdu'l-Bahá en 1921, kiam la bahaan komunumon ekgvidis Lia nepo Shoghi Effendi<sup>6</sup>, ankaŭ tiu plu kuraĝigis lerni kaj uzi la lingvon kaj i.a. mem plurfoje per plej estimaj kaj kuraĝigaj vortoj salutis Universalajn Kongresojn de Esperanto.

Tamen devas oni konscii ke ne povas la bahaanoj decidi pri la estonta monda helplingvo, sed ke tion devos efektiviĝi la politikaj gvidantoj de la homaro, ke »la registaroj de la mondo pere de siaj parlamentoj estas alvokataj efektiviĝi tiun ĉi gravegan leĝon.«<sup>7</sup> Sekve la bahaanoj sin precipe engaĝas por la ĝenerala principo enkonduki iun internacian helpan lingvon.

La nuntempan sintenon bone resumas la jena citaĵo: »La Universala Domo de Justeco<sup>8</sup> opinias ke, se ĝi elektus iun lingvon uzendan por la bahaanoj kiel internacia helpa lingvo, tio nuntempe kaŭzus pli da malfacilaĵoj ol per tio solviĝus. La geamikoj [t.e. la bahaanoj] tamen, memorante ke tio estas unu el la tre gravaj principoj de la Kredo, farus bone se ili apogus la koncepton kiam ajn eblas kaj preĝus ke la tempo ne estu tre fora kiam la registaroj de la nacioj adoptos ununuran lingvon instruendan en ĉiuj

lernejoj de la mondo kiel helpas apud la gepatra lingvo de la lernantoj.«<sup>9</sup> Jen ankaŭ koncize la fokuso de la bahaaj esperantistoj, kiuj ek de la sepdekaj jaroj de la 20a jarcento kolektiĝas en Bahaa Esperanto-Ligo.

### *La antaŭpaŝoj*

Jam en la 1910aj jaroj en diversaj Esperanto-gazetoj tra la mondo troveblas mencioj kaj tutaj artikoloj pri la Bahaa Kredo, kio indikas aktivan agadon de bahaanoj-esperantistoj.<sup>10</sup> Aparte grandan impluson donis la vojaĝoj de 'Abdu'l-Bahá tra la Okcidento en 1911–1913 kun plurfojaj paroladoj Liaj antaŭkunvenoj de esperantistoj.

Ankoraŭ hodiaŭ en la baha mondo tre bone konataj tiutempaj bahaaj agantoj – ĉar en postaj jaroj ili distingiĝis per la rango de »Mano de la Kozo de Dio«, kiun ricevis entute nur 50 elstaraj agantoj, kun la lastaj nomumitaj en 1957 – estis Martha L. Root, kiu ne malpli ol kvarfoje rondiris la terglobo dum sia preskaŭ dujardeka konstanta vojaĝado por diskonigi la Kredon kaj kiu dum tiu multokaze utiligis Esperanton, Agnes Baldwin Alexander, kiu aktivis precipe en sia hejma Havajo kaj en Orientazio, John E. Esslemont, kiu i.a. verkis tre gravan enkondukon en la Bahaan Kredon *Bahá'u'lláh kaj la nova epoko*, Hermann Grossmann, kiu plejparte redaktis la unuan internacian kaj esperantlingvan bahaan gazeton *La Nova Tago* kaj kiu multe artikolis, kaj Adelbert Mühlischlegel, kies nomo aperis jam en la lastaj n-roj de *La Nova Tago* kaj kiu evidente jam en la 30aj jaroj aktivis ankaŭ esperaniste antaŭ ol pli poste li fariĝis la unua prezidanto de BEL. Kaj super ĉiuj tuj brilas la lumo de Lidia Zamenhof, la »Filino de Esperanto«<sup>11</sup>, kiu post sia bahaaniĝo meze de la 1920aj jaroj ĝis sia pereco en la gaskameroj de Treblinka en 1942 estis la elstara aganto por la diskonigo de la Kredo inter la esperantistoj kaj regule dum la Universalaj Kongresoj kaj je aliaj okazoj prelegis pri la Kredo kaj verkis pri ĝi artikolojn, eseojn kaj rakontojn.<sup>12</sup>

Indiko pri la influo de tiutempaj bahaanoj-esperantistoj troveblas en la revuo *Oomoto*, kiu ene de plurera serio pri la historio de la propra movado en sia n-ro 430 (julio–decembro 1989) skribis: »En aprilo, 1923, du usonaj bahaaninoj, s-

ino Finch kaj s-ino Root, vizitis Oomoto-centron en Ajabe kaj interparolis kun s-ro Onisaburo. Ili tute simpatiis unu al la alia. Tiam Oomoto ankoraŭ ne estis enkondukinta Esperanton. Kompreneble la du bahaanoj estis esperantistoj kaj oni povas supozi ke ĉi tiu renkontiĝo fariĝis unu el la motivoj de enkonduko de Esperanto en Oomoton.«

Organizita agado de bahaanoj-esperantistoj komenciĝis kiam ekfunkciis la baha esperanta gazeto kaj eldonejo *La Nova Tago – La Internacia Bahaa Esperanto-Gazeto* en 1925 de la »Esperanto-komitato de la Baha'i-movado Hamburg«, kiun esence formis probable Hermann Grossmann kaj Friedrich Gerstner. Al ĝiaj stabo kaj kunlaborantoj dum la sekvaj jaroj apartenis tiel eminentaj bahaanoj kaj esperantistoj kiel Lidia Zamenhof, Martha Root, John Esslemont, Auguste Forel, Vuk Echtner kaj prof. Paul Christaller. Kiel la unua vere internacia gazeto en la baha mondo celis *La Nova Tago* fariĝi la centra organo por la tutmonda baha komunumo kaj samtempe proksimigi la esperantistaron al Bahaismo. Al tiuj du celoj servis ankaŭ la kromaj eldonaĵoj inter kiuj elstaras la tradukoj, faritaj de Lidia Zamenhof, de *Bahá'u'lláh kaj la nova epoko* (aperinta en 1930) kaj *Parizaj Paroladoj de 'Abdu'l-Bahá* (1932). Tamen, ĉar *La Nova Tago* funkciis en Germanio ĉesis ĝi kun la malpermeso de Esperanto en 1936 kaj de la Bahaa Kredo en 1937 fare de la nazioj. Tiel organizita baha Esperanto-agado haltis kaj kun la milito preskaŭ komplete nuliĝis.

Post la Dua Mondmilito ne sukcesis provoj restarigi la gazeton, sed ja inter marto 1947 kaj oktobro 1949 aperis entute 14 n-roj de la *Bahaaj Informoj*, kiujn eldonis la Internacia Bahaa Oficejo en Ĝenevo. En la postaj tri jardekoj nur rare videblis la Kredo en la Esperanto-gazetaro kaj konkludeblas ke nur kelkaj bahaanoj-esperantistoj, probable unuopuloj, ie kaj tie provis vivteni la kontakton inter la movadoj kaj utiligi la Esperanto-movadon kiel forumon por disvastigi Bahaismon.

Estas indikoj ke la ideo pri fondo de ia asocio de bahaaj esperantistoj leviĝis jam komence de la sesdekaj jaroj kaj precipe antaŭ la 1966-a UK en Budapeŝto. Tiuj ĉi klopodoj ligiĝas al d-ro Adelbert Mühlischlegel, sed ili restis sen konkretaj rezultoj. Supozeble ilin fonis ke plu multis

esperantistoj en Orienteŭropo kaj ke Esperanto estis rimedo por eniri tiujn landojn, kiel ja pruvis tion la Universalaj Kongresoj en Budapeŝto (1966 kaj 1983), Beogrado (1973) kaj Varna (1978). Esperanto en la jardekoj tuj post la falo de la »fera kurteno« grave rolis je la starigo de bahaaj komunumoj en tiuj landoj. Estas iom mirige ke la fondo de BEL sukcesis pli ol jardekon antaŭ tiuj historiaj evoluoj, tiel ke ekzistis jam agantoj kaj materialoj por utiligi la novajn eblecojn.

### *La fondo de BEL kaj unuaj agadoj*

Estis post kiam en Brazilo Paŭlo Amorim Cardoso en 1971 akceptis la Kredon, ke per liaj klopodoj – kaj helpe de precipe la usonanino Roan Orloff-Stone, kiu estis konatiĝinta kun Lidia Zamenhof dum ŝiaj instruvojaĝoj tra Usono en 1937/38 kaj estis same Cseh-instruistino – relative rapide realiĝis la ideo fondi organizaĵon de bahaanoj-esperantistoj. Per letero de julio 1971 Cardoso – tiam nome de kaj kiel sekretario de la Loka Spirita Asembleo de la bahaanoj de Fortaleza, Brazilo – skribis: »ni celas fondi Bahaan Internacian Esperanto-Asocion«. Li aldonis skizon de statuto, kiu difinis kiel celojn de la fondota asocio eldonadon de bahaa literaturo en Esperanto kaj la disvastigon de la Kredo inter la esperantistoj kaj de la lingvo Esperanto inter la bahaanoj. Aldonita al lia letero estis listo kun sume 18 nomoj de bahaaj esperantistoj en Brazilo (8), Hindio (1), Hispanio (1), Irano (1), Portugalio (1) kaj Usono (6). La letero de Cardoso estis supozeble skribita al ĝuste tiuj personoj. Sed estis almetita krome ankoraŭ listo de pliaj 47 adresoj en 13 landoj, preskaŭ la duono el Usono, kompilita de Roan Orloff-Stone. Krome Cardoso sub la nomo *Komuna Bahaa Letero* komencis verki cirkuleron, kiu poste fariĝis la unua organo de la Ligo.

Estis dum la 57-a UK en 1972 en Portland, Usono, ke kunvenis la naŭ partoprenantaj bahaanoj kaj decidis submeti peton al la Universala Domo de Justeco, ke ĝi aprobu la fondon de asocio de bahaanoj-esperantistoj. Post konsulto de Mano de la Kozo de Dio d-ro Adelbert Mühlischlegel, kiu laŭ ĝi estis »entuziasma« pri tiu propono, la Universala Domo de Justeco donis sian aprobon per letero

datita la 19-an de marto 1973 (18.19.129 de la Bahaa Epoko): jen la naskiĝdato de Bahaa Esperanto-Ligo.

Per la 5-a numero (aprilo 1973) de la *Komuna Bahaa Letero* estis diskonigita al la kolektitaj adresoj de bahaanoj-esperantistoj la aprobo de la Universala Domo de Justeco. Ankaŭ jam estis dissenditaj aliĝiloj kaj balotiloj por la elekto de unua estraro. Tiu elekto sekvis la modelon de la lokaj kaj landaj gvidorganoj ene de la bahaa komunumo, la t. n. Spiritaj Asembleoj, nome: sen kandidatigoj ĉiu membro voĉdonas por naŭ el ĉiuj membroj de la komunumo. Per aparta letero de la 30-a de julio estis diskonigita la rezulto de tiu elekto en kiu voĉdonis 30 personoj. Elektitaj estis s-ro Paŭlo Amorim Cardoso (Brazilo), s-ino Roan Orloff-Stone (Usono), s-ro Habib Taherzadeh (Israelo [Bahaa Mondcentro]), d-ro Adelbert Mühlischlegel (Svisio), s-ro Badiollah Samimy (Irano), s-ro Manuel de Freitas (Portugalio), s-ro S.C. Gupta (Hindio), s-ro Chagzin Kim (Koreio) kaj s-ino Leonora Stirling Armstrong (Brazilo). La estrara oficperiodo estis fiksita al tri jaroj.

Per numero 9 (novembro 1973) de la *Komuna Bahaa Letero* estis informita ke »BEL posedas 73 membrojn el 14 landoj: Argentino 1, Aŭstrio 1, Brazilo 24, Germanio 1, Hispanio 3, Italio 2, Irano 4, Israelo 1, Kanado 4, Koreio 1, Nederlando 1, Portugalio 2, Svisio 1, Usono 27«. Kaj en la sekva 10-a numero (januaro 1974) estis la estrara oficdivido anoncita: »Jen la unua estraro de nia jam karega Bahaa Esperanto-Ligo: Kunordiganto: Adelbert Mühlischlegel el Germanio, Vickunordiganto: Habib Taherzadeh el Israelio, Sekretario: Paŭlo Amorim Cardoso el Brazilo, Vicsekretariino: Roan U. Orloff Stone el Usono, Kasisto: Manuel Freitas el Portugalio, Vickasisto: Leonora Stirling Armstrong el Brazilo. La aliaj membroj estas Badiollah Samimy el Irano, S.C. Gupta el Hindio kaj s-ino Chagzin Kim el Koreio.« Krome estis anoncita ke laŭ pli frua decido ĉiuj tiuj membriĝintaj ĝis la formiĝo de tiu unua estraro aŭtomate fariĝus fondaj membroj de BEL: estis 80 membroj el 17 landoj.

La unuaj aktivecoj de la Ligo estis, apud la kolekto de membroj, la eldono de unuaj simplaj bahaaj materialoj en Esperanto kaj traktado pri la esperantigo de bahaaj terminoj kiel ekz. de la Kredo mem (el la alternativoj Bahá'í Kredo,

Bahaja Kredo kaj Bahaa Kredo oni voĉdonis por la lasta), la 19 monatonomoj de la bahaa kalendaro. Ankaŭ la Ligo submetis al UEA peton fariĝi kunlaboranta faka asocio, kio efektiviĝis la sekvan jaron, 1975, dum la UK.

Malgraŭ ĉiaj atingoj la unuaj jaroj por la nova Ligo estis sufiĉe malfacilaj. Precipe pro la disĵetiteco de ne nur la membraro sed ankaŭ la estraranoj tra la tuta mondo limiĝis la agado al tiu de unuopuloj kaj multo koncentriĝis ĉe la sekretario. La unua estis P. A. Cardoso, Brazilo. Apud li plej grava por la disvolviĝo de la Ligo estis Roan Orloff-Stone, Usono, kiu partoprenis ĉiujn Universalajn Kongresojn inter 1976 kaj 1988. La Ligo tiel povis helpe de tiuj ĝiaj motoroj kaj kelkaj kromaj membroj kutime almenaŭ reprezenti Bahaismon ĉe la UK-oj.

En 1976 BEL faris provon revivigi la gazeton *La Nova Tago*. Kun la tempindiko »Splendoro 133« (ĉ. marto 1976) aperis la unua, seppaĝa numero, en kiu estis klarigita ke la BELanoj en Fortaleza lanĉis ĝin »en sia Nova Fazo« kiel oficialan organon de BEL direktitan ankaŭ al la ĝenerala esperantistaro. Pliaj numeroj tamen ne aperis. Sed daŭris iom ankoraŭ la komence unupaĝa kaj ek de la 12a numero dupaĝa *Komuna Bahaa Letero*, de kiu probable aperis entute 20 numeroj. Sekvis ĝin du numeroj de t. n. *Bahaa Noticoj*, kiujn evidente ankaŭ Cardoso redaktis.

En la duan estraron de 1976 eniris John T. Dale Jr., Usono, kiu fariĝis ĝia nova sekretario kaj kiel antaŭe Cardoso signife difinis la trajtojn de la Ligo. Per multa elano li kontribuis ideojn pri la plua evoluado de la Ligo kaj iniciatis kelkajn, ĉefe eldonajn projektojn. Ankaŭ transprenis li la redaktadon de la bulteno de la Ligo, al kiu li donis la novan nomon *BELmonda Letero* (kiu ĝis hodiaŭ restas), sed konservis la nombradon de ties antaŭintoj tiel ke la unua numero fariĝis la 23a.

Aperis post tiu unua, kvarpaĝa numero tamen nur ankoraŭ du numeroj – ambaŭ sen tempindiko sed probable en 1979 – sub la redaktado de Dale. Numero 24 estis 16-paĝa kaj numero 25 eĉ 60-paĝa. Tiu ĉi lasta inkluzivis tradukojn de sciencaj novaĵ-artikoloj kaj pri la Unuiĝintaj Nacioj, originalajn kaj tradukitajn poemojn kaj prozaĵojn, tradukojn de preĝoj kaj meditaĵoj de Bahá'u'lláh, raportojn de diversaj personoj, radio-programan skripton pri la Kredo, artikolon pri la institucio de la Mashriqu'l-Adhkár (maŝrekol'-azkar' = bahaa

templo), leterojn al la redaktisto, anoncojn pri novaj eldonaĵoj, kaj ilustraĵojn.

La Ligo en tiu periodo daŭre plusuferis pro la disĵetiteco de la membraro kaj estraro kaj ke eĉ la estraranoj la plej multajn anojn tute ne konis persone. Tiutempe, en 1979, oni devis ankaŭ ĉesigi kontakton kun la bahaaj esperantistoj en Irano (sur la balotlisto el 1976 estis 16 irananoj), kiuj, post la t. n. »islama revolucio« en tiu jaro, estus endanĝerigitaj per korespondado kun la Okcidento.

Unu el la ĉefaj taskoj, kiujn donis al si John Dale kiel sekretario de BEL, »estis korekti la oftégajn miskomprenojn inter la bahaanoj mem pri Esperanto«. Li trovis ke la plej multaj bahaanoj favoras aŭ la anglan kiel estontan mondlingvon aŭ, malgraŭ ke eble favoraj al Esperanto, ne emas ĝin lerni kaj uzi antaŭ ol la Universala Domo de Justeco rekte alvokus al tio. »Por alfronti tiajn miskomprenojn kaj malhelpojn al la laboro de la BELanoj, mi komencis krei diversajn aferojn: (1) Kompilaĵon de la Bahaaj Skribaĵoj pri Esperanto kaj la lingva problemo. ... (2) Kolekti diversajn historiajn bahaajn esperantajn dokumentojn kaj tradukojn en Esperanto de diversaj bahaaj tekstoj. ... (3) Krei informfoliojn kaj bazajn dokumentojn en la angla kaj la esperanta lingvoj, kiuj estus helpaj al la disvastiĝo de BEL inter la bahaanoj kaj esperantistoj. Ekzemploj de tiaj aferoj inkluzivis *How to Become a Linguistic World Citizen*, *The Baha'i Esperanto League: A Forum for Teaching the Faith and Learning the International Language* kaj novaĵ-elsendojn pri la ĝisdatigita traduko de *Baha'u'llah kaj la Nova Epoko*... «.

La reldono en 1978 de la reviziita, ampleksigita kaj apendicita, jam de Martha Root iniciatita kaj de Lidia Zamenhof plenumita traduko de *Bahá'u'lláh kaj la nova epoko* de John E. Esslemont, la plej grava kaj plej disvastiĝinta enkonduko al Bahaismo, estis certe unu el la plej grandaj atingoj de tiu periodo. Krome estis eldonitaj en 1976 trilingve (portugale, hispane kaj esperante; ĝi ankaŭ aperis en sia angla originalo) la broŝuro *Unueco kaj universala lingvo* verkita de Dale, en 1977 la broŝuro *Bahaa Respondoj* kaj en 1981 en dua eldono *La Kaŝitaj Vortoj*, unu el la centraj verkoj de Bahá'u'lláh konsistanta el 153 mallongaj aforismoj, kiu en »la robo de koncizo« prezentas tion, kio estis »revelaciita al la Profetoj de l' pasinto«.

En 1979 Dale sendis leteron kun ekzemplero de *La BELmonda Letero* al ĉiuj Naciaj Spiritaj Asembleoj (tiam 130; hodiaŭ estas ĉ. 180) por anonci al tiuj la ekziston de BEL kaj komenci kunlaboron kun naciaj grupoj. Dale ankaŭ turniĝis al la Universala Domo de Justeco petante ke ĝi »konsideru la dumtempan, eksperimentan adopton de Esperanto en iu maniero por pli forte instigi al la Bahaanoj lerni la lingvon«. Similon jam pli frue estis farinta Cardoso. Sed tiuj klopodoj restis senfruktaj. La Universala Domo de Justeco konservis sian politikon kaj ne emis entrepreni ian oficialan, eĉ se nur eksperimentan enkondukon de Esperanto ene de la bahaanaro. Cardoso evidente iom post iom tiel seniluziiĝis per la vaneco de siaj tiurilataj esperoj ke kelkajn jarojn poste li forlasis la Kredon. Li tamen ankoraŭ servis en la tria estraro de 1980 kaj eĉ kiel ĝia prezidanto resp. »estrarestro«. La listo por tiu baloto entenis pli ol 150 nomojn en preskaŭ 30 landoj, la plej multaj en Usono, Brazilo kaj Germanio.

### *La viglaj 1980aj kaj 1990aj jaroj*

En 1981 la Ligo donis al si novan statuton, kiu i.a. reduktis la nombron de estraranoj al kvin, sed en 1988 dum la Roterdama UK denove ŝanĝis ĝin kaj i.a. reampleksigis la nombron de estraranoj al naŭ. Krome, por certigi funkciopablan estraron, de nun komenciĝis proceduro de nomumado, resp. ke la ekŝiganta estraro proponas la sekvontan, konfirmas ĝin membrokunveno kaj aprobas ĝin la Nacia Spiritaj Asembleo de la lando, en kiu loĝas la sekretario, ĉar al tiu lando la Universala Domo de Justeco estis asigninta la administran responson por BEL, kiu tiel migris de Brazilo (Cardoso), tra Usono (Orloff-Stone) kaj Luksemburgo (Parini) al Germanio (Westerhoff), kie ĝi restas ekde 1992.

Tiuperiode, kaj kun la agadcentro de BEL pli kaj pli transiranta de Ameriko al okcidenta Eŭropo, precipe Germanio, la Ligo unue spertis signifan antaŭenpuŝon. Tion multe helpis ke tiutempe Esperanto ene de la baha komunumo akiris la reputacion de »enirbileto« al la landoj malantaŭ la t. n. »fera kurteno«, kien la Kredo ĝis tiam apenaŭ povis penetri. Aparte grave rolis la UK 1986 en Pekino, kiun partoprenis pli ol deko

da BELanoj el preskaŭ sammulte da landoj, kaj la jubilea UK 1987 en Varsovio, kiun partoprenis la probable plej multaj bahaanoj iam ĉeestintaj Universalan Kongreson: ĉirkaŭ kvindek el preskaŭ dudek landoj.

Apud la centra Ligo eĉ funkciis bahaaj Esperanto-komitatoj resp. BEL-sekcioj en Germanio, Usono, Britio, Svisio kaj (ek de 1993) Bulgario. Post la IJK en Krakovo 1987 dum kelkaj jaroj la Ligo povis krome starigi junularan sekcion, JuBEL, kiu sukcesis dum manpleno da sinsekvaj Internaciaj Junularaj Kongresoj kaj aliaj porjunularaj eventoj certigi partoprenon de kelkaj junaj esperantistoj-bahaanoj kaj kontribui al ties programoj.

Prosperis ankaŭ la eldonado: Aperis la traduko de la tre grava *La Promeso de Monda Paco*, mesaĝo de la Universala Domo de Justeco al la popoloj de la mondo okaze de la Internacia Jaro de Paco 1986, kaj du belaj, multkoloraj broŝuroj *La Vojo al Paco* (1987) kaj *La Bahaa Kredo* (1989). En 1989 BEL krome kunrealigis la eldonon de la konata kompilaĵo de O. P. Ghai *Unueco en diverseco. La unusola vero en la skriboj de ĉiuj religioj*. En 1992 aperis mezampleksa kolekto de 53 bahaaj preĝoj, la 60-paĝa broŝuro *Bahá'u'lláh* (okaze de la tiujara centa datreveno de la forpaso de la Fondinto de la Kredo) kaj en 1994 sub la titolo *Perloj de l' Saĝo* same 60-paĝa kompilaĵo el la skriboj de Bahá'u'lláh.

Fine de la 80aj kaj komence de la 90aj jaroj BEL povis organizi etan serion de t.n. *BELaj Tagoj*, plurtagaj seminarioj en Esperanto pri la Kredo, de kiuj tri okazis en Pollando kaj po unu en Slovakio kaj Bulgario. Krome dum pluraj jaroj okazis jara BEL-seminario en La-Chaux-de-Fonds, Svisio.

Kaj ĝuste en 1992, la centjariĝo de la forpaso de Bahá'u'lláh kaj la fondoĵaro de la Nacia Spiritaj Asembleo de Pollando, la pola ĵurnalisto kaj tiama vicprezidanto de UEA Roman Dobrzynski dum la UK en Vieno prezentis la esperantan version de sia filmo pri Bahaismo kaj ĝia mondcentro en Ĥajfo, Israelo, sub la titolo »La ŝafejo de la naŭa Profeto« – filmo je kies realigo lin subtenis ankaŭ BELanoj.

La sekvaj ĉerpaĵoj el *La BELmonda Letero* ekzemple atestas pri la vigeleco de tiu periodo: *Printempo 1982*: »Fondiĝis la Nikaragua Esperanto-Ligo ... kun ĉeesto de kvin personoj, du el ili bahaanoj: s-ino Julie Regal, elektita

sekretariino, kaj s-ro Steven Berger, vic-prezidanto. Kiam s-ino Regal alvenis al Nikarago en aŭgusto 1980, ŝi estis la sola Esperantistino en tiu lando.« »*Kaŝitaj Vortoj* de Bahá'u'lláh estas preta.«

*Aŭtuno 1982*: »...la du artikolojn en EL POPOLA ĈINIO pri Martha Root kaj pri Lidia Zamenhof... Ĉi tiuj artikoloj estis senditaj al la gazeto laŭ peto de la Universala Domo de Justeco.«

*Printempo-Somero 1983*: »Estas havebla nun la sonbendigita libro – BAHÁ'U'LÁH KAJ LA NOVA EPOKO – por blinduloj.« »Aperis artikoloj, precipe pri la persekutadoj en Irano, en: *Literatura Foiro ...*, *Oomoto ...*, *Horizonto ...*, *Paco*.« »La Vic-Estrarestro ĉeestis la elekton de la Universala Domo de Justeco. Li raportas: "En Hajfa, dum la Internacia Kunveno, oni multe parolis pri la UK kaj Esperanto dum kunveno de eŭropaj NSA-oj kiuj respondecas pri instruado de la Kredo en Orienta Eŭropo."«

*Aŭtuno 1983*: Raporto pri la UK en Budapeŝto kun ĉeesto de 11 BEL-anoj kaj pluraj pliaj bahaanoj: »...lunde matene je ĉirkaŭ la 10a horo ni komencis meti la BEL-literaturon sur la montrotablon; ni apenaŭ komencis tion fari kiam amaso da kongresanoj sieĝis nian budon. Ili staris en tri vicoj! En tiu mateno ni respondis al ĉirkaŭ 400 informpetintoj el ĉiuj landoj. Tiel estis dum la tuta semajno. ... La BEL-kunsido okazis ĵaŭde ... ni montris la lumbildojn al pli ol 100 kongresanoj...«

*Vintro 1983-1984*: »Aŭstrujo: ... okazis enkonduka kurso pri Esperanto al 20 bahaanoj. Dum la vintro-lernejo ... okazis ĉiutagaj Esperanto-lecionoj.« »Kelkaj deĵorantoj ĉe la Internacia Bahaa Komunumo en Nov-Jorko nun studas Esperanton.«

*Somero 1984*: Sciigo pri la forpaso en Irano de BELano Badiollah Samimy, verkinto i.a. de vortaro Persa-Esperanto. »En la nacia bahaa kunveno en aprilo en Wilmette, Usono, BEL provizis al ĉiu delegito en la dosieroj kompilaĵon pri Esperanto...«

*Aŭtuno 1984*: »La agadoj ... dum kaj post la 69a Univerala Esperanto-Kongreso en Vankuvero, Kanado estis tute kontentigaj.«

*Printempo 1985*: Raportoj pri aktivecoj de BELanoj en dekduo da landoj.

*Aŭtuno 1985*: Sciigo pri la apero de la Lidia-biografio verkita de Wendy Heller kaj anonco ke

pretas Koresponda Kurso pri la Kredo. »BEL estas fiera pri Germanujo, ĉar la NSA de Germanujo estas la unua NSA en la mondo, kiu nomis Esperanto-referaton [tri-membran]. ... Ili faras bonegan laboron, multaj bahaanoj en Germanujo nun studas Esperanton.«

*Vintro 1985-1986*: »... la kasisto de BEL nun pasigas kelkajn monatojn en Aŭstralio kaj en Papua Nov-Novgvineo. Dum la "libertempo" li propagandas por Esperanto inter la bahaanoj kaj por la Bahaa Kredo inter la Esperantistoj.« »Johano Hammes ... ĉeestis ... la Internacian Bahaan Junularan Kongreson en Botsvano. Li prelegis pri la principo de internacia lingvo. Rezulte, li havas inviton prezenti Esperanto-kurson dum la [bahaa] Somerlernejo en Svazilando.«

*Septembro-Decembro 1986*: Raporto pri la sukcesa partopreno de 12 BELanoj el 8 landoj en la 71a UK en Pekino: »Ankaŭ estis BEL-budo. Eĉ kvankam tri aŭ kvar BEL-anoj servis kune ĉe la budo, estis preskaŭ neeble prizorgi ĉiujn informpetantojn, ĉar ili staris en tri vicoj por serĉi informon.« »Hindio: La LSA de Lucknow ofertis al la Esperantistoj la Bahaan Centron por ilia Kongreso. Rezulte, pluraj Esperantistoj montris intereson pri la Bahaa Religio.« »Jamajko: Ĉe la Vintra Lernejo ... ĉeestis 75 bahaanoj. Unu el la interesaj studobjektoj estis Esperanto, en formo de dramo, kantoj, diskutoj. Du artikoloj aperis en la Bahaa Bulteno. Estas klaso en Kingston kun 9-12 lernantoj.« »Dum la Jarkunveno Bahaa en Wilmette [Usono] estis BEL-budo...«

*Januaro-Marto 1987*: »En Germanio, Svislando kaj Britio ekzistas novaj Bahaaj Esperantaj organizoj, kiuj estas subtenitaj de iliaj NSA-oj.« »Norvegio: La Esperanto Klubo de Oslo prezentis programon ĉe la Bahaa Centro. La tuta vespero estis mirinde sukcesa.« Raportoj pri agadoj en deko da aliaj landoj.

*Majo-Junio 1987*: Raportoj pri agadoj en deko da landoj – i.a. en pluraj germanaj urboj. La t.n. "pacmesaĝo" de la Universala Domo de Justeco vekas multan interesiĝon inter la esperantistoj kaj ĝia letero de septembro 1986 al plejparto de la eŭropaj bahaaj Naciaj Asembleoj, kun alvoko kunlabori kun la esperantistoj, vekis multan interesiĝon inter la bahaanoj pri Esperanto.

*Julio-Septembro 1987*: Preskaŭ 20 Naciaj Asembleoj sendis gratulojn al UEA kaj sia landa Esperanto-

organizaĵo okaze de la centjariĝo de Esperanto. Raportoj pri agadoj en pli ol dekduo da landoj sur kvar kontinentoj.

*Oktobro-December 1987:* Ampleksa raporto pri la ege sukcesa partopreno de 48 BELanoj el 17 landoj en la Jubilea Kongreso en Varsovio inkluzive la gratulleteron de la Universala Domo de Justeco al UEA; disdoniĝis 8.000 broŝuroj kaj vendiĝis pli ol 250 bahaaj libroj en la UK-libroservo. Raporto ankaŭ pri la partopreno de 13 junaj BELanoj el 6 landoj en la IJK en Krakovo. Kaj el la jarraporto de BEL: »Dum la pasinta jaro BEL bonvenigis 30 novajn membrojn de ĉiuj kvin kontinentoj.« »... de La Promeso de Monda Paco ... el la 4.000 presigitaj ekzempleroj ni distribuis pli ol 3.000...«

*Januaro-Marto 1988:* »[post la UK en Varsovio] Jam pli ol 70 personoj skribis por ricevi pliajn informojn pri la Bahaa Kredo, partopreni la Korespondan Kurson, ktp.« BEL bonvenigas 22 novajn membrojn. Raportoj pri agado en deko da landoj, ekz.: »La Esperantistoj de Meksikio kune kun la Bahaanoj festis la centjariĝon de Esperanto per bela kunveno...«

*Aprilo-Junio 1988:* El dekduo da afrikaj esperantistoj invititaj de UEA al Eŭropo estis tri bahaanoj, kiuj laŭ UEA impreso kondukis.

*Julio-Septembro 1988:* Raporto pri la ĉiun kvinan jaron okazanta baha internacia konvento en Ĥajfo: inter la delegitoj estis 11 BELanoj; oni ofte tie aŭdis pri Esperanto. »La Esperanto-grupo ŝajnas esti unu el la plej viglaj ... en la mondcentro, kaj la membroj de la Domo de Justeco ege kuraĝigas iliajn aktivecojn.« Membroj de la brazila Nacia Asembleo estis »tre kontentaj kaj entuziasmaj pri iliaj kontaktoj kun la brazilaj esperantistoj.«

*Oktobro-December 1988:* En la IJK en Zagrebo partoprenis 19 BELanoj el 8 landoj kaj »la baha grupo estis unu el la plej aktivaj«.

BEL nun havis ĉ. 250 membrojn en ĉ. 40 landoj.

*Julio-Septembro 1989:* Raportoj i.a. pri BELanaj kontribuoj al konferenco de la Asocio por Bahaaj Studoj en Kanado kaj la tria semajnfina seminario de BEL en La Chaux-de-Fonds.

*Oktobro-December 1989:* En la UK en Brajtono partoprenis 38 bahaanoj el 12 landoj.

*Januaro-Marto 1991:* Aliĝis al BEL i.a. 11 esperantistoj el Sovetunio kaj 4 el Rumanio. En februaro okazis denove BEL-seminario en La-

Chaux-de-Fonds, en majo BELaj Tagoj en Suprasl apud Bjalistoko kaj en novembro baha Esperanto-rekontiĝo en Rybnik apud Krakovo.

*Julio-Septembro 1991:* El raporto de la BEL-sekretario: »BEL-membraro nun superas 400 el pli ol 60 landoj. La landaj esperantaj komitatoj en Germanio, Usono, Britio kaj Svislando estas aktivaj kiel ankaŭ aliaj komitatoj en Moskvo, Malajzio, Brazilo ktp. ... En multaj landoj la Bahaa Kredo disvastiĝas dank al Esperanto.« Raportoj pri agadoj en 15 landoj.

*Oktobro-December 1991:* 40 novaj aliĝoj al BEL.

*Junio-Septembro 1992:* Po 1 nova BELano el Usono, Bulgario, Rusio, Taĝikio, Aŭstralio, Nepalo kaj Ruando.

*Oktobro-December 1992:* 32 BELanoj aktivis en la UK en Vieno. En Pollando okazis denove BELaj Tagoj. Listo de po kvin libroj kaj broŝuroj pri la Kredo en Esperanto.

*Januaro-Marto 1993:* En aŭgusto okazis informkampanjo de BEL inter esperantistaj kaj bahaaj instancoj. En novembro en Novjorko dum la Bahaa Mondkongreso kun 30.000 partoprenantoj okazis renkontiĝo de ĉ. 35 esperantistoj. BELaj Tagoj en Poprad, Slovakio, kun pli ol 20 partoprenantoj el 7 landoj. Dum la jaro okazas reviziado de la membraro: ĉiu BELano aktive konfirmu sian anecon – rezulte la membraro ĉ. duoniĝis de pli ol 400 al iom pli ol 200.

*Julio-Septembro 1993:* Okazis BELaj Tagoj en majo en Monki, nordorienta Pollando, kun ĉ. 30 paroprenantoj kaj vintre la 7a BEL-seminario en La Chaux-de-Fonds kun ĉ. 20.

*Aŭtuno 1994:* BEL per sendo de ampleksa dosiero al la Esperanto-gazetaro atentigas pri la kvindeka datreveno de la pereado de Lidia Zamenhof en Treblinka.

*Printempo 1995:* La jarraporto mencias agadojn i.a. ĉe la la UK en Seulo kaj la ELNA-kongreso, la aperon de *Perloj de l' Saĝo el la Skriboj de Bahá'u'lláh*. Kaj ĝi notas ke la landaj sekcioj »en Britio, Bulgario, Germanio, Svisio kaj Usono ... estas ĉiuj ankoraŭ tre feblaj, nematuraj« sed ankaŭ ke »precipe el vastega Rusio dum la pasinta jaro venis multnombro ege kuraĝiaj signaloj«.

*Aŭtuno 1995:* La UK-n en Tampere, Finnlando, partoprenis 19 bahaanoj el 11 landoj. Raportoj pri agadoj en Pollando, Rusio, Kamerunio, Kostariko kaj Britio.

*Printempo 1996:* En sia jarraporto la estraro konstatas ke ĝi »apud la kuraĝigaj signoj ankaŭ frontas kelkajn zorgodonajn ... Daŭre la kelkaj landaj sekcioj montriĝas ankoraŭ luktantaj por sia nura pluekzistado kaj apenaŭ sukcesas signife kaj valore kontribui al la diskonigo de nia Kredo en la koncernaj landaj esperantistaj medioj.«

*Aŭtuno 1996:* Ĉe la UK en Prago viglis almenaŭ 25 BELanoj el pli ol 10 landoj.

*Vintro 1996:* Kvar BELanoj ĉeestis la unuan Azian Kongreson en Ŝanhajo, Ĉinio.

*Printempo 1997:* Listo de 25 BELanoj kun retadreso.

Jen kio en la 1980aj kaj 1990aj jaroj en *La BELmonda Letero* elstaris pri la agado de BEL.

Pri *La BELmonda Letero* mem raporteblas ke ĝi baldaŭ post la ambiciaj provoj de John T. Dale ĝin pli vaste utiligi kaj pluevoluigi ree ŝrumpis al modesta du- ĝis sespaĝa bulteno. Mallonge ĝi havis du diversajn usonajn redaktantinojn antaŭ ol ĝian redaktadon ek de probable n-ro 9 (klara indiko mankas) transprenis la tiutempa sekretariino Roan Orloff-Stone, kiu ĝin redaktis ĝis n-ro 20. Ek de la n-ro 21 resp. Januaro-Marto 1987 ĝin redaktis June Knudsen Fritz, Usono, kaj aperis ĝi, signife beligita, tre regule kvarfoje jare, ampleksanta inter kvar kaj plej ofte ses tre dense skribitajn paĝojn. Tiel daŭris ankaŭ ek de kiam en 1994 la redaktado transiris al Bernhard Westerhoff, Germanio, kiu komencis indiki numerojn, komencante la nombradon je la unua *BELmonda Letero* redaktita de Dale (tiel ke li komencis redaktadon de n-ro 51, vintro 1994-95, 151 BE / 4) kaj kiu precipe ekkomencis fari la laboron komputile, kio donis tute novan aspekton al la bulteno, kiu tamen precipe dum la unuaj jaroj sub lia redaktado restis relative modesta, ekz. senkolora. Sed iom post iom aperis pli kaj pli da fotoj, kiuj iam ankaŭ fariĝis koloraj.

Ekde 1998 BEL ankaŭ havas propran hejmpaĝon, kiu de tiam estis dufoje (en 2009 kaj en 2019) komplete renovigita kaj troviĝas nun ĉe <https://bel.bahai.de/>.

Sian 25jariĝon en 1998 BEL markis per la aperigo de informriĉa 60paĝa broŝuro resp. »festlibro« pri la rilatoj inter Bahaismo kaj Esperanto kaj ĝin festis unue en aprilo per aranĝo en Homburg, Germanio, konekte kun la tiea Kultura Semajnfino de Sarlanda Esperanto-Ligo, kaj dum la UK en Montpeliero per akcepto ĉe kiu

reprezentanto de UEA tre laŭde kaj inspire komentis la jubileon.

Dum la jaroj de post la 25jariĝo respektive de ĉirkaŭ la nova jarmilo ja BEL stabilis kaj konstantis kaj jen kaj jen havis raportindajn sukcesojn kaj atingojn. Sed ĝenerale la aktivecojn de la estraro kaj la membraro karakterizis relative malalta nivelo.

### *La dua kvaronjarcento de BEL (1998-2023)*

Jam post la vigla jaro 1992, deklarita kiel sankta en la bahaa mondo pro la 100a datreveno de la forpaso de Bahá'u'lláh, la aktivecoj de BEL iom pli malmultiĝis. La 25jariĝo en 1998 estis bona okazo por iom pli da vicleco, el kiu iom konserviĝis per la agado almenaŭ dum la Universalaj Kongresoj en 1997 en Adelajdo, kie la loka bahaa komunumo amplekse kontribuis per diversaj servoj, jaron poste en 1998 dum la UK en Montpeliero, 1999 en Berlino, 2000 en Tel-Aviv kaj 2001 en Zagrebo. En tiuj UKoj partoprenis po ĉ. 20 BELanoj – en la postaj jaroj estis ofte nur manpleno aŭ eĉ malpli.

Konekte kun la UK en Tel-Aviv en 2000 dekduo da BELanoj faris antaŭe tritagan pilgrimadon al la bahaaj sanktejoj en Ĥajfo kaj Akko kaj poste forte subtenis la LKK-n je la organiza laboro precipe dum la unua kongresa tago. Tiun kongreson formale salutis dum la inaŭguro oficiala reprezentanto de la Universala Domo de Justeco; kaj estraranoj de UEA faris viziton al la sidejo de la Universala Domo de Justeco kaj estis tie akceptitaj de unu el ĝiaj membroj. La bahaa mondcentro estis ankaŭ celo de unu el la oficialaj kongresaj ekskursoj.

La duan kvaronon de la disvolviĝo de BEL krome markas i.a. la jenaj atingoj:

- Ekde 2000 funkcias reta dissendolisto »BELanaro« al kiu iom post iom aliĝis preskaŭ la kompleta BELanaro, kiu tiel ankaŭ ekster *La BELmonda Letero* povas ricevi kaj interŝanĝi aktualajn informojn.
- En 2002 plia grava iniciato de la Universala Domo de Justeco, nome alvoko al interreligia toleremo kaj dialogo, direktita al la gvidantoj de la religioj, estis subtenata de BEL per traduko de la alvoko kaj ĝia dissemado en esperantaj rondoj, precipe religiaj.



- Aperis Esperanto-traduko de Ruhi-libro 1 (la unua el pli ol dekduo da kursaraj libroj por studi la fundamentojn de la Bahaa Kredo) en 2002 kaj ankaŭ de ĝia funde reviziita versio de 2020 ankoraŭ tiujare.
- En 2004 en Pekino al la Nitobe-Simpozio, kiel jam en 1996 al la unua en Prago, estis invitita kaj kontribuis oficiala reprezentanto de Bahaa Internacia Komunumo, la NRO reprezentanta la tutmondan bahaaron ĉe UN.
- En 2005 aperis en Esperanto-traduko la 20-paĝa *Unu komuna Kredo* verkita kaj eldonita nome de la Universala Domo de Justeco.
- Okaze de la 100-jariĝo de UEA en 2008 BEL transdonis al UEA la gratulojn de la Universala Domo de Justeco, same kiel poste ĉe la 100a UK (Lille 2015). Kaj en 2017 Bahaa Internacia Komunumo oficiale skribis al UEA okaze de la centa datreveno de la forpaso de Ludoviko Lazaro Zamenhof.
- En 2009 aperis bela reviziita traduko de la *Kaŝitaj Vortoj* kaj sub la titolo *Bahaismo kaj Esperanto* reviziita kaj multe beligita versio de la festlibra broŝuro el 1998.

Krom tiuj atingoj almenaŭ menciindas la apero ĉe FEL en 2007 de la Esperanto-traduko de la biografio de Lidia Zamenhof verkita de Wendy Heller *Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof. Filino de Esperanto* kaj de la originala verkaro de Lidia Zamenhof sub la titolo *Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj*. La unuan libron tradukis la BEL-sekretario kaj la duan li kunredaktis. Tiel BEL estis, se ne rekte, tamen ja envolvita kaj multe profitis el tiuj publikigoj.

Kaj grava projekto, kiun origine John T. Dale iniciatis jam en 1970aj jaroj, estis la aperigo de ampleksa kompilaĵo el la bahaaj skriboj pri la principo de internacia helpa lingvo. Tion BEL mem povis fine realigi per la apero en 2015 de *The Greatest Instrument for promoting Harmony and Civilization* ĉe la konata bahaaj eldonejo George Ronald, Oxford, redaktita de la bahaaj lingvisto d-ro Gregory P. Meyjes, kiu ankaŭ verkis por ĝi fakulan enkondukon. Kaj kvar jarojn poste en 2019 BEL sukcesis publikigi la esperantan tradukon de tiu pli ol 100-paĝa »kompilaĵo el la bahaaj skriboj kaj rilataj fontoj pri la demando de internacia helpa lingvo« sub la titolo *La plej granda rimedo por antaŭenigi harmonion kaj civilizacion*.

La membraro de BEL, kiu ĉe la reviziado en

1993 de pli ol 400 preskaŭ duoniĝis, iom post iom realtiĝis dum la sekva jardeko al denove pli ol 400 – en 2003 estis 412 en 60 landoj – kaj dum la postaj jaroj restis relative konstanta kun foje iom sub plejparte iom super 400, ĝis kiam el denova severa reviziado en 2014 ree rezultis preskaŭa duoniĝo. De tiam nur tre malrapide ĝi ree kresketis ĝis al 216 membroj en 54 landoj en 2022 kun la plej multaj en Germanio (42), Usono (26), Aŭstralio (14) kaj Hispanio (11).

La Ligo dekomence sin financas per libervolaj donacoj de siaj membroj kaj neniam aplikis kotizsistemon. Krom la kontribuoj de ĝiaj membroj BEL ricevas foje subtenojn de unuopaj Naciaj Spiritaj Asembleoj – de nun jam jardekoj la germana Nacia Asembleo ĝin regule subtenas – aŭ de aliaj bahaaj instancoj.

*La BELmonda Letero*, post kelkaj duoblaj numeroj ek de numero 77 (aŭtuno 2001) definitive aperas nur ankoraŭ dufoje jare en printempo kaj aŭtuno, kun nun tamen regule 12 paĝoj. La *BELmonda Letero* daŭre funkcias sole kiel interna informilo entenanta internajn informojn, gravajn adresojn, estrarajn komunikojn, novaĵojn pri membraj aktivecoj en unuopaj landoj kaj tradukitajn erojn el la bahaaj skriboj; krome ĝi raportas pri novaĵoj kaj evoluoj en la Esperantomovado. Ĝin ricevas aŭtomate ĉiuj BELanoj sen abono. En 2022 la estraro tamen decidis ĝin principe ankaŭ malfermi por amikoj de la Kredo. Per ĝi BEL sukcesis krei firman bazon de interna informado. Sed ĝis hodiaŭ ne estas reatingita la stato de la periodo de *La Nova Tago*, nome havi veran organon por ekstera informado kaj por propagando de la Kredo. Sed ja por tio nun servas precipe la retejo de BEL.

Dum la lastaj jaroj BEL fokusis sian agadon je aktiva partopreno de la Universalaj Kongresoj – kutime partoprenas minimume 2-3 BELanoj, foje manpleno aŭ eĉ deko da –, en jen kaj jen alia grava aranĝo, foja artikolado en la esperanta gazetaro kaj la eldonado de pliaj eroj el la fundamentaj verkoj de la Kredo kaj de gravaj aktualaj dokumentoj, ĉu komplete kiel en 1986 *La Promeso de Monda Paco*, en 1992 *Bahá'u'lláh* kaj en 2008 *Unu komuna Kredo*, aŭ per resumaj faldfolioj, kiel en 1996 *La prospero de la homaro kaj Turnopunkto por ĉiuj nacioj*. Foje BEL ankaŭ informas ene de la bahaaj komunumo diversmaniere pri la lingvo kaj movado esperanta.

Dum tra la antaŭaj jaroj la estrara laboro okazis preskaŭ senescepte pere de retmesaĝa komunikado, ĝi signife pli vigliĝis kiam kun la pandemio en 2020 pli kaj pli normaligiĝis interretaj kunvenoj. Tiel ekde tiu jaro ankaŭ la estraro de BEL apud siaj retmesaĝaj interŝanĝoj havas en trisemajna ritmo retan kunsidon. Krome okazas unufoje monate reta membrokunveno.

Novan spronon donis tri gravaj datrevenoj: en 2017 la ducenta datreveno de la naskiĝo de Bahá'u'lláh, en 2019 la ducenta datreveno de la naskiĝo de la Báb kaj en 2021 la centa datreveno de la forpaso de 'Abdu'l-Bahá. Okaze de ĉiuj tiuj

datrevenoj la Universala Domo de Justeco publikigis apartan mesaĝon kaj filmojn, kiujn BEL tradukis al Esperanto respektive subtitoligis; krome estas kvara filmo pri la disvolviĝo de la tutmonda bahaa komunumo dum la cent jaroj de la forpaso de 'Abdu'l-Bahá subtitoligita. Ĉio tio estas publikita respektive libere alirebla en la retejo de BEL.

Kaj plia kulmino en ĝia evoluo nun staranta antaŭ Bahaa Esperanto-Ligo estas en 2023 ĝia kvindekjariĝo al kiun digne festi ĝi nun prepariĝas.

\* \* \*

<sup>1</sup> Arabe: »Gloro de Dio« (pr.: baha'-ulla'); titolo de Mírzá Husayn-'Alí (pr.: mirza husejn alí'), 1817-1892, la fondinto de Bahaismo; la skribojn de Bahá'u'lláh bahaanoj konsideras esti rekta revelacio de Dio

<sup>2</sup> *Perloj de l' Saĝo - El la Skriboj de Bahá'u'lláh*, p. 28 (BEL, Germanio, 1994)

<sup>3</sup> Bahá'u'lláh, *Tablets of Bahá'u'lláh revealed after the Kitáb-i-Aqdas*, 11:9 + 13  
Meyjes, Gregory P., *La plej granda rimedo*, Kompilaĵo el la Behaaj Skriboj kaj rilataj fontoj pri la demando de internacia helpa lingvo, BEL 2019, p. 5

<sup>4</sup> Isaj Dratwer, *Lidja Zamenhof. Vivo kaj agado*, Antverpeno – La Laguna, 1980, p. 60;  
Wendy Heller, *Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof. Filino de Esperanto*, FEL, Antverpeno 2007, p. 126/7

<sup>5</sup> Arabe: »Servanto de Bahá« (pr.: Abdul-baha'), titolo kiun donis al si 'Abbás Effendi, 1844-1921, plej aĝa filo kaj nomumita posteulo de Bahá'u'lláh

<sup>6</sup> Pr.: ŝogi efendi; titolo de Shoghi Rabbani, 1897-1957, pranepo de Bahá'u'lláh kaj plej aĝa nepo de 'Abdu'l-Bahá, nomumita de 'Abdu'l-Bahá kiel »Gardanto« de la Bahaa Kredo, oficon kiun li plenumis de la forpaso en 1921 ĝis sia propra morto en 1957

<sup>7</sup> Kitáb-i-Aqdas, noto 193

Meyjes, Gregory P., *La plej granda rimedo*, p. 45

<sup>8</sup> La Universala Domo de Justeco estas la plej supera gvida kaj leĝdona organo de la tutmonda bahaa komunumo kun sia sidejo en Ĥajfo, Isrealo; ĝi instaligiĝis en 1963 laŭ la direktivoj de Bahá'u'lláh kaj 'Abdu'l-Bahá; ĝi elektiĝas ĉiun kvinan jaron de la membroj de ĉiuj Naciaj Spiritaj Asembleoj de la bahaanoj

<sup>9</sup> El enkonduko al kompilaĵo preparita en januaro 1985 komisiite de la Universala Domo de Justeco;  
Meyjes, Gregory P., *La plej granda rimedo*, p. 52

<sup>10</sup> Bernhard Westerhoff, *La kontaktoj inter la movadoj esperanta kaj bahaa kiel ili speguliĝas en la esperantaj periodaĵoj*, magistra laboraĵo, ELTE, Budapeŝto 1993

<sup>11</sup> Wendy Heller, *Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof. Filino de Esperanto*, FEL, Antverpeno 2007

<sup>12</sup> *Por ke la tagoj de la homaro estu pli luma*. La originala verkaro de Lidia Zamenhof, FEL, Antverpeno 2008  
Wendy Heller, *Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof. Filino de Esperanto*, FEL, Antverpeno 2007



**Bahaa**

**Esperanto-Ligo**

Iniciatita en 1972 kaj fondita en 1973  
Kunlaboranta kiel faka asocio kun  
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO ek de 1975

Bahaa Esperanto-Ligo (BEL)

Eppsteiner Straße 89, DE-65719 Hofheim-Langenhain, Germanio

T +49-(0)6192-9929-16 • F +49-(0)6192-9929-99

bel@bahai.de – <https://bel.bahai.de/>

© Bahaa Esperanto-Ligo, 2023 – 179 BE